De l'avis d'*Eckhard Bick*, de l'Institut des Langues et de la Communication de l'Université du Sud-Danemark, spécialiste en la matière, l'anglais se prête mal au rôle de langue-pont : "*L'anglais fonctionne mal comme langue-pont pour Google, par exemple entre le danois et le suédois. Dans notre firme [GramTrans] nous traduisons ou directement, sans langue-pont, ou avec une langue-pont typologique ment très parente, soit avec la langue source, soit avec la langue de destination (le cas des langues scandinaves entre elles)*".

Eckhard Bick a réalisé la traduction automatique en espéranto de la version complète en anglais de **Wikipedia** (3 874 611 articles ...) sous le nom de WikiTrans.

Un superbe cadeau de *Google* pour le 125ème anniversaire de l'espéranto !



Henri MASSON

(NB de *La Informilo* : extrait d'un courriel)

Un nouveau conte en espéranto a été mis en ligne par **BookBox.com**

Voix et sous-titrage en espéranto

<http://www.youtube.com/watch?v=HuDI4jdhCsQ>



Esperanto-muzeo... de rekordo al rekordo !

Palais Mollard - Vieno



Sensacian rekordon povas festi la Esperanto-muzeo de la *Aŭstria Nacia Biblioteko*: **9.781 gevizitantoj** venis dum la jaro 2011 vidi la ekspozicion. Por komparo: En 2009 ankoraŭ estis 5.886, en 2010 jam estis 7.523.

La kialo de tiu duobliga kresko en nur du jaroj estas plurfaceda: La muzeo ofertas specialajn programojn, kiuj trovas grandan interesecon ĉe la publiko: *Longa Nokto de la Muzeoj*, *Longa Nokto de la Lingvoj*, *Tago de Monumento*, *Tago de la Malfermita Pordo*. 41 lernejoj klasoj partoprenis la gvidadojn por infanoj kaj junuloj. 870 personoj, *precipe lernejoj kaj metilernantoj, ĉeestis fulm-kursojn por Esperanto*. Al tio aldoniĝas, ke la *Aŭstria Nacia Biblioteko*, al kiu apartenas la Esperanto-muzeo, faras profesie altnivelan publiklaboron, kio kreskigis konsiderinde la averaĝan nombron de la ĉiutagaj gevizitantoj.

Alia kialo de la pozitiva bilanco certe estas la fakto, ke la koncepto de la muzeo sin direktas al personoj, kiuj ĝenerale interesiĝas pri lingvoj, kaj metas Esperanton en la pli vastan kuntekston de la lingva problemo unuflanke, kaj de historia evoluo aliflanke. Esperanto prezentiĝas al la publiko do ne kiel kuriozaĵo, sed kiel **parto de la monda kulturo**.


En rilato kun sia grandeco, la Esperanto-muzeo estas la plej ofte vizitata muzeo en Vieno.

El la historio de la Esperanto-muzeo

La Esperanto-muzeon fondis *Hugo Steiner* en 1927 en formo de asocio, sed jam en 1928 ĝi fariĝis laŭ oficiala kontrakto parto de la *Aŭstria Nacia Biblioteko*. La solena inaŭguro okazis en 1929 en la pompa salono de la tiel nomata *Hofburg*. Post kiam la nazioj invadis Aŭstrion (1938), la *Gestapo* fermis la muzeon, kaj oni planis sendi la librojn al Berlino por krea biblioteko de libroj malpermesitaj fare de nazioj. Sed la argumento, ke la havaĵoj de la Esperantomuzeo apartenas al la *Aŭstria Nacia Biblioteko*, efike malebligis tiun transporton.

La remalfermo okazis en 1947 en la *Hofburg* sub Mikaela kupolo. En 1990 fondiĝis per ministeria decido la *Kolekto por Planlingvoj*, kaj tiel strukture disiĝis la funkcioj de muzeo kaj biblioteko. En 2005 okazis solena malfermo de la komplete renovigita muzeo en **Palais Mollard**, kiu situas en la centro de Vieno.

"Word Race" ... unua *iphon-ludo* en Esperanto !



Hodiaŭ*** aperas la unua *iPhone-ludo* en Esperanto, *Word Race*. Ĝi estas nekutima ludo pro tio, ke oni ludas grupe kun amikoj anstataŭ sole.

Oni devas klarigi vorton al sia teamo sen uzi la malpermesitajn vortojn. Ekzemple, se la vorto estas « *barbo* », oni ne rajtus diri « *haroj* » aŭ « *Zamenhof* ». La teamo, kiu plej rapide klarigas siajn vortojn venkas.

La provludo senpagas, sed per lanĉ-oferton oni povas aĉeti la ĝeneralan vortpakaĵon kontraŭ 2,39 € (kutime kostas 2,99 €). Ni poste volas eldoni ankaŭ vortpakaĵon nur pri Esperanto-kulturo !

Nia retejo : <http://www.wordraceapp.com>

Intervjuo ĉe *Libera Folio* : http://www.liberafolio.org/**2012/kiel-difini-melonon-ne**dirante-frukto

*** ret-mesaĝo : 11an de februaro

Ĝuu !

Chuck Smith

The Universal Language



« The Universal Language » (La Langue Universelle) est un nouveau documentaire du réalisateur *Sam Green*, Oscar 2004 du film documentaire à San Francisco pour "*The Weather Underground*" sur la gauche radicale étasunienne anti-impérialiste et anti-raciste dans les années 1969-1976.

Le film de 30 mn retrace l'histoire de l'espéranto, et constitue un instantané du mouvement actuel pour l'espéranto. Dans ce documentaire pionnier sur la langue, Green entremêle des entretiens et des portraits qu'il a filmés lors de plusieurs congrès mondiaux avec un trésor jamais vu d'images d'archives sur Zamenhof et le mouvement durant la première époque de l'espéranto. Le film inclut aussi des entretiens avec *Humphrey Tonkin*, *Renato Corsetti*, *Arika Okrent* et beaucoup d'autres. Prof. de littérature anglaise à l'Université de Princeton, *Esther Schor* dit du film : "*Si le test d'une langue universelle est de savoir s'il nous parle à tous, alors la langue universelle passe le test avec brio.*"

Le DVD inclut plusieurs ajouts excitants et du sous-titrage en espéranto, anglais, espagnol, français, allemand, chinois, italien, russe, néerlandais, portugais, suédois, coréen, danois, grec, maltais, bulgare, finnois, tchèque et hongrois !

A propos de The Universal Language sur le site de *Sam Green*

A propos de The Universal Language sur le site *Esperanto-Documentary*



DVD : disponible à la boutique d'Espéranto-France

18€ + 3,60 € (frais d'envoi)

contact : butiko@esperanto-france.org

Téléchargement :

1. Lecture en ligne ("*streaming*" : en haute définition avec sous-titrage seulement *en anglais* et *espéranto* jusqu'à maintenant) : 4,99 US \$

Téléchargement numérique (pour visionner sur ordinateur ou TV) : 4,99 US \$

“alvoko”de Sam Green ...

« Mi kontaktas vin por vidi, ĉu vi povus sciigi informojn pri *The Universala Lingvo**** al al viaj grupanoj.

Vi povas trovi pliajn informojn en nia retejo <http://dokumentafilmo.com>

aŭ en nia *Fejsbuk-paĝo* <http://www.facebook.com/EsperantoDocumentary>

Dankegon pro via helpo diskonigi tion. Ni ĝojus kunordigi spektadon de la filmo kun vi, aŭ oferti rabaton por DVDoj. Sentu libere kontakti nin ĉe eomovie@gmail.com se vi havas demandojn, aŭ eĉ se vi nur volas diri saluton.

Bondezirojn ! ».

Sam Green kaj la teamo de "*La Universala Lingvo*"




(Noto el la redaktejo de « La Informilo » - Kiel supre menciite, tiu filmo en angla lingvo havas **sub-titilojn en esperanto**).

Renato Corsetti, eksprezidanto de UEA diris: "*Mi spektis La Universalan Lingv-n kun granda plezuro kaj esperas, ke ĝi sukcesas kiel ĝi meritas. Se oni spektos ĝin televide, tiu pensos pli pri Esperanto.*

Kelkaj homoj en Kopenhago sin esprimis, ke oni devintus fari pli propagandecan filmon. Ili ne komprenas, ke objektiva filmo estas pli forta."

Tibor Sekelj ... ethnologue, écrivain, journaliste et... espérantiste



Le 14 février 2012 ce n'est pas seulement la Saint-Valentin, c'est aussi le centième anniversaire de la naissance de **Tibor Sekelj**, né le 14 février 1912 à *Spišská Sobota* en Autriche-Hongrie (aujourd'hui en Slovaquie), mort le 23 septembre 1988 à Subotica en Yougoslavie, Vojvodine.

A l'occasion du centenaire de sa naissance, l'Union européenne d'espéranto a proclamé l'année 2012 « *Année de Tibor Sekelj* ».

Journaliste, explorateur, ethnologue, écrivain, *Tibor Sekelj* est certainement l'une des figures les plus intéressantes de l'histoire de l'espéranto. Il avait étudié le droit à l'université de Zagreb, mais sa carrière fut essentiellement celle d'un journaliste et d'un explorateur.

Il avait appris 25 langues, dont l'espéranto.

De 1939 jusqu'à la fin de sa vie, *Tibor Sekelj* a été un voyageur infatigable.

Il a entrepris des expéditions à travers l'Amérique du Sud, l'Asie et l'Afrique.

En 1944, **il planta le drapeau de l'espéranto** sur le plus haut sommet d'Amérique, *l'Aconcagua*. Il a fait le récit de ses voyages et expéditions dans plusieurs livres, comme *Tempête sur l'Aconcagua*, *Nepalo malfermas la pordon* (*Le Népal ouvre la porte*), *Ĝambo rafiki. La karavano de amikeco tra Afriko* (*La caravane de l'amitié à travers l'Afrique*). Certains ont connu un grand succès et ont été traduits en plus de 20 langues.

Tibor Sekelj est d'ailleurs sans doute **l'auteur espérantophone le plus traduit en langues nationales**. *Kume-ŭaŭa, la filo de la ĝangalo* (*Kumewawa, le fils de la jungle*), livre pour enfants sur la vie des indiens au Brésil, originellement écrit en espéranto, a été **traduit en 26 langues** !

Lors de ses voyages à travers le monde, il accumula une importante collection ethnographique qu'il donna au Musée ethnographique de Zagreb.

Il était membre de l'Académie d'Espéranto et membre honoraire d'UEA, l'association mondiale d'espéranto. Il a plaidé la cause de l'espéranto auprès de l'**UNESCO**, et lors de la 27e conférence générale en 1985 à Sofia, a été adoptée une résolution en faveur de l'espéranto.

http://fr.wikipedia.org/wiki/Tibor_Sekelj

Dominique C.

TELESKOPO

Internacia Scienca Revuo <http://www.teleskopo.com>



Teleskopo estas scienca revuo, aperanta surrete, por publikigi internacilingve, artikolojn pri diversaj, sciencaj fakoj, kiuj povas esti elŝutitaj tute senpage pere de kiu ajn komputilo, konektita al interreto, kie ajn tra la mondo.


Redaktas *Dominique Vieira*, Doktoriganto pri Historio ĉe Federacia Universitato de *Go-lás*, Brazilo.

Por sendi al la revuo *Teleskopo* viajn opiniojn, demandojn, sugestojn, kritikojn kaj tiel plu, simple kontaktu nian redaktoron pere de la retpoŝtadreso redaktoro@teleskopo.com

Artikoloj en la tria eldono (jaro 2011)

- *Apertium* kaj Esperanto – Enkonduko al peregula maŝintradukado *al* kaj *el* Esperanto per malferm-koda platformo
- *Jacob Nordfalk* kaj *Hector Alos i Font*.
- *Aterosklerozo* – Epidemologio, evoluo – *Anthony Lucas*.
- *Monografio* pri la Gotha-letero de L.L. Zamenhof – La enigma odiseado de Zamenhofa letero – *Bert Boon*.
- *Pech Maho* – Opidumo en Suda Gaŭlio – *Arno Lagrange*.

Montru ni kune al la ekstera mondo, ke Esperanto estas vere riĉa literatura lingvo !



La 22an de februaro 1911, en pariza teatro "Femina", gazeto "Excelsior" organizis E-feston, en kiu arda esperantisto *Tristan Bernard* deklaris, ke Esperanto estas sufiĉe fleksebla lingvo por, sen perdo de esprimeblecoj, partopreni en konkurso de "duobla traduko".

En 1913, komisiono, gvidita de Tristan Bernard, okazigis tian konkurson. En la komisiono, krom Tristan, estis verkisto *Abel Hermant* (membro de Franca Akademio de Sciencoj en 1923), kaj verkisto kaj ĵurnalisto *Alexandre Hepp*. Abel Hermant disdonis propran franclingvan tekston al 6 francaj volontuloj por traduki ĝin al lingvoj *rusa, germana, angla, itala hispana* kaj *Esperanto*. Post plenumo de la tradukoj, li transdonis ilin al aliaj volontuloj, kiuj retradukis ilin en la francan.

La ĵurio estis mirigita : la itala kaj Esperanto **preskaŭ ekzakte** restarigis la originalan tekston. Ne tiom bonaj estis rezultoj de la tradukoj tra *la rusa* kaj *angla*, kaj estis eraroj en traduko tra la *hispana*. La konkurso pruvis, ke Esperanto estas "*majstroverko de logiko kaj simpleco*", kiel oni poste nomis ĝin. Dum preskaŭ cent jaroj de tiu tempo, esperanto tre riĉigis kaj estas nun multe pli riĉa literatura lingvo ol ĝi estis tiam.

(*Jefim Zajdman*, internacia aktivulo el urbo *Jalta*, Ukrainio, proponas organizi similajn "Konkursojn pri Tradukojn".

Detalojn vi povas legi ĉe <http://www.traduko.com.ua/intro.htm>).

Le 22 février 1911, au théâtre parisien « *Fémina* », le journal « *Excelsior* » organisait une fête de l'espéranto au cours de laquelle *Tristan Bernard*, ardent espérantiste, déclara que l'espéranto était une langue suffisamment souple pour participer, sans perdre de possibilités d'expression, à un concours de « *traduction double* ».

En 1913, une commission, sous la direction de Tristan Bernard, organisa un tel concours. Dans cette commission, hormis Tristan, se trouvait *Abel Hermant* (qui devint membre de l'Académie Française des Sciences en 1923) et l'écrivain et journaliste *Alexandre Hepp*. Abel Hermant distribuait un texte en français dont il était l'auteur à 6 volontaires français, priés d'en donner la traduction en *russe, allemand, anglais, italien, espagnol et espéranto*. Les traductions effectuées, il les transmettait à 6 autres volontaires dans le but de les retraduire en français.


Le jury fut plus qu'étonné : l'italien et l'espéranto avait redonné presque exactement le texte original. Le résultat des traductions passées par le russe et l'anglais n'étaient pas d'aussi bonne qualité et la traduction passée par l'espagnol comportait des erreurs. Le concours prouvait que l'espéranto était « *un chef-d'œuvre de logique et de simplicité* » comme on allait le définir plus tard. Presque cent ans ont passé, l'espéranto s'est considérablement enrichi, et de nos jours s'avère être une langue littéraire beaucoup plus performante qu'elle ne l'était au moment évoqué.

(*traduction libre*)

voĉdonado

UEA kaj TEJO partoprenos en la grava konferenco RIO+20 de Unuiĝintaj Nacioj okazonta en junio 2012 en

Rio-de-Ĵanejro.



UEA proponis, ke en ĝia programo estu la kurso "*La rolo de Esperanto en la daŭripova evoluo*", kiu prezentus elementojn de Esperanto kaj ĝian rolon por daŭripova evoluo. La propono konkurencas kun multaj aliaj proponoj, kaj unu estos elektita per voĉdonado en Interreto.

Oni povas voĉdoni por la programero pri Esperanto en jena retejo:

<http://www.uncsd2012.org/rio20/index.php?page=vieŭ&type=700&nr=98&menu=23>

Oni voĉdonas enskribante sian retadreson en la fenestreto dekstre. Poste venos mesaĝo al la anoncita adreso. Per klako sur la ligilo donita en la mesaĝo oni konfirmas sian voĉon.



Petit rappel Bien entendu !

Muzaiko est une nouvelle radio par internet, émettant 24h sur 24h en espéranto.

On peut l'écouter en se rendant sur le site suivant : Muzaiko.info sur Radionomy.com

A savoir que plus on l'écoute, plus elle aura de chances de perdurer !

Une bonne idée !... Bona ideo !

A l'Auberge de la Jeunesse,
tiré du livre "Belle jeunesse" de Marcelle VIOUX
LECTURE ET LANGUE FRANCAISE
classes de *Fin d'Etudes*, édité par la librairie ISTRÀ de Strasbourg en 1950
(ce texte est pris à la page 207)



A l'auberge de la jeunesse (celle-ci est à Hossegor, dans les Landes).

[... / ...]

On s'exclamait **en quatre ou cinq langues**. C'était un tel raffut que la mère aubergiste s'enfuit en riant, les mains sur les oreilles. Un gamin de quinze ans, presque nu et couronné de fleurs, sentant l'algue et l'iode, se précipita, ivre de soleil, de faim, de course et de nage... En raflant un des morceaux de pain que tailait une Danoise, il hurlait:

« *La soupe! la soupe!* ...

- *Assieds-toi, misé-rable!* beugla un grand rouquin, en jetant une épaisse tranche de viande saignante sur l'assiette avidement tendue...

Las de remplir d'eau les bouteilles tout de suite vidées, un convive apporta l'arrosoir plein sur la table. Deux filles cramoisies de santé se levèrent pour aller préparer le café dans la cuisine adjacente. Des quolibets roulaient; des discussions intéressantes se noyaient sous le flot des interjections. La flamme de la jeunesse brillait dans tous les yeux. Enfin, le café servi et bu, tout le monde se leva, escaladant avec fracas tables et chaises. Les cinq inscrits au tableau faisaient la vaisselle à la chaîne.. Une petite Danoise aux yeux de mer la lavait, une étudiante en pharmacie la rinçait, un licencié en droit lui donnait le premier coup de torchon, un agrégé d'histoire fignolait le séchage, et un employé des postes la rangeait dans le placard.

Après quoi, on se rua, pour la sieste, dans les dortoirs frais...

Sur les lits, on fumait, on discutait. L'un voulait que chacun fit son tour d'Europe et apprît à vivre dans la nature et avec les hommes.

« *Se gagner des amitiés aux quatre coins de l'Europe, c'est-à-dire se comprendre enfin.*

- **Apprendre l'espéranto**... renchérit un autre.

- **Pourquoi pas ? Ce serait une langue de liaison, chaque pays gardant sa langue originelle.**

- **Approfondir la fraternité...** ».

Puis ils parlèrent des *Auberges de la Jeunesse* de l'étranger qu'ils connaissaient. Celles de France n'étaient pas toutes au point, les parents aubergistes étaient plus ou moins accueillants et compréhensifs. - Mais celle d'ici... Un ban pour Mme Tissot ! [... / ...]

Texte signalé par Ginette MARTIN

NB - el la redaktejo : opinio de leganto : "... Ĉu S-ino Tissot, vere meritas iun *ban* (laŭtakta aplaŭdo), permesante al siaj junaj gastoj ...*fumi sur la litoj* ... ? "



... el nia ret-skatolo ...

Bonan matenon, karaj !

Espereble vi ĉiuj bonfartas...

Hieraŭ atingis min la kuranta, nr 156 de « La Informilo ». Dankon!

Gratulojn al vi pro ĉiam kvalita laboro kun la revuo. Oni povas sciigi per ĝi pri la aktivecoj de orientfrancaj samideanoj, pri aliaj eventoj en Esperantio, nelaste ankaŭ pri novaj libroj kaj anekdotoj. Interese ke ĝi aperas dulingve. Mi opinias, ke tio ne estas deviga pro francaj leĝoj, sed por altiri la atenton al Esperanto kaj ties agado ĉe neesperantistoj. Tre bone!

La fotoj el la aktivecoj ĉe vi rememorigas min ĉiam la agrablan kaj amikan etoson en via sino.

Ĉion bonan al vi ĉiuj!

Amike kaj dankeme,
Bardhyl (Albanio)



Mi estas la plej feliĉa homo de la mondo



Ho ve ! Kia pretendemo ! Ĉu mi povus tiel fanfaroni, kiam ne eblas forgesi la malfeliĉojn de multaj homoj ? Ankaŭ mia patrino taksas sin malfeliĉa kaj ne ĉesas plendi kaj suspiri. Ĉu mi devus esti ne feliĉa ĉar aliaj estas malfeliĉaj ? Kiuj devus venki la aliajn, la malfeliĉuloj aŭ la feliĉuloj ? Laŭ mi, ni devas, jes ni devas, elekti la feliĉon, ĉar kiam oni estas feliĉa la vivo estas pli bela, agrabla, bona, ktp. Fine neniu devas venki la aliajn. Eble se la feliĉuloj povus konvinki la malfeliĉulojn, ke estas pli agrable esti feliĉa. Eble. Tamen la malfeliĉuloj rajtas esti malfeliĉaj, se ili ne deziras aŭ vere ne povas esti feliĉaj !

Sed estas la malbono, la laboro, la najbaroj kaj la aliaj, kiuj tudas nin. Sed estas la zorgoj : malsano, maljuniĝo, milito, malsato, manko de mono, ktp. Tiu « sed » devus esti malpermesita vorto, kiam oni estas feliĉa kaj tia volas resti. Oni ĉiam trovas kialojn por esti malfeliĉa. Se tamen venas situacio, kie estas pli malfacile provi tamen esti feliĉa, kion fari ? Oni povus esti feliĉa, ke la afero ne estas ankoraŭ pli grava, ĉar ĝi povus ĉiam esti pli grava ĉu ne ? Do feliĉe la afero ne estas pli grava.

La zorgoj kaj problemoj estas interesaj aferoj. Tiel oni ne enuas, kaj oni povas plezure unue sin demandi ĉu oni ne inventis problemon, kiu ne estas vera problemo, kaj due serĉi solvojn, renkonti aliajn homojn, peti helpon, kaj tiel havi diversajn okupojn, kiuj donas sencon al la vivo. Tiam feliĉe oni havas ion por fari. Kaj kiam oni solvas la problemojn, retrovas la sanon, ktp, oni povas esti kontenta do ankoraŭ pli feliĉa. Oni diras, ke feliĉe oni ekhavis tiujn problemojn, ĉar oni multe lernis, renkontis interesajn homojn, ricevis amon, konsilojn, rimedojn, ktp, do la vivo estas vere bela. Mi pensas ke estas ĉiam bona flanko en ĉio.

Jes, evidente ĉe la fino oni mortas. Timi pri la morto estas nature. Ĉu ni estu malfeliĉaj pro nia morto ? Ne, dum oni vivas oni ne estas morta, kaj kiam oni ne plu vivas oni estas morta. Kie estas la problemo ? Post la morto ne plu estos sento kaj problemo. Se tamen estos io post la morto. Ni vidos. Kial putrigi la nunan vivon pri afero, pri kiu ne eblas ion serioze scii ? Mi diras ofte, al homoj kiuj amare venas al mi plendegi pri siaj tro multaj gravaj problemoj : feliĉe vi havas problemojn, ĉar ekde la momento, kiam vi ne plu havos problemojn, vi certe estos morta. Do vivi estas havi problemojn kaj provi solvi ilin. Kaj post la morto eble estas nenio : do bone ; eble estas io : do ni vidos.

Mi estas la plej feliĉa homo de la mondo. Ĉu vi envias min ? Tuj forpelu tiun senton, ĉar tio ankaŭ malebligas vian feliĉon. Ne enviu min, ĉar se

vi konvinkus min, ke vi estas pli feliĉa ol mi, mi tute konsentus esti la dua homo la plej feliĉa de la mondo tuj post vi. Kaj tiel mi estos ankoraŭ pli feliĉa unue pro via granda feliĉo kaj pri mia iomete malpli granda feliĉo, kaj due pro la ŝanco, ke tiel mi havas ankoraŭ eblon progresi.

Mi ofte provokeme diras al mia patrino : la vivo estas bela. Ŝi kolere tuj respondas : ne, la vivo ne estas bela. Se ne necesus respekto kaj deziro eviti gravajn problemojn kun mia patrino, mi povus min ruli surtere ridante ĝis ostarompado. Sed mi tute ne komprenas mian patrinon, kiu bedaŭrinde ĉiam decidis dum sia tuta vivo esti malfeliĉa kaj vidi la mondon kaj la vivon nur ĉe la malbona flanko kaj esti kontenta pri preskaŭ nenio. Tamen, mi devus danki ŝin, ĉar tiel almenaŭ ŝi malkovrigis al mi, ke tio tute ne estas bona maniero por esti feliĉa kaj pasigi agrablan vivon.

Do fine mi estas la plej feliĉa homo de la mondo eĉ se, kiel multaj homoj, mi travivis malfacilajn eventojn. Unu estis, kaj ankoraŭ estas en mia penso, tragika. Kelkfoje mi koleras aŭ montras malĝojan vizaĝon. Mi diras, ke en tiu kazo mi volas ne tro malĝojigi la aliajn pro mia ĝojo. Sed pli serioze, feliĉe mi estas nur homo, kaj ankaŭ estas kapabla havi malbonajn sentojn, dubojn, zorgojn, elreviĝojn. Esti homo, simpla homo, ordinara homo, tio estas tiom bona, ke mi nur povas esti feliĉa.

Pardonu, sed mi humile, modeste, honteme konfesas, ke mi vere estas la plej feliĉa homo de la mondo. Evidente tie mi ridetas pri mi mem, mi estas klaŭno. Mi estas klaŭno por mi. Se nur mi povus esti ankaŭ klaŭno por vi. La klaŭno, kiu ŝerco proponas al vi serĉi (ŝerco serĉi, hihi !) la bonan flankon en ĉio kaj ŝerco permesas al si inviti vin ĉiam prefere elekti esti feliĉa, ĉefe kiam tio tute ne eblas. Se mi nur iomete sukcesus, mi estus ankoraŭ pli feliĉa. Evidente ĉe homoj, kiuj estas grave malsanaj kaj/aŭ en teruraj suferoj, kion fari ? Fari la klaŭnon povus esti taksata kvaŝaŭ mokado, insulto. Tio estas sufero por mi, sed ne sufiĉe por perdi mian feliĉon. En tiu kazo : aŭskulto, atento, pacienco, sen eksceso montri kompaton kaj kunsuferon, iomete provi paroli pri la alia flanko (la plej bona, ol tiu kiun oni unue vidas), la espero, la ebla ĝojo ke oni povus havi batalante por resaniĝi aŭ solvi la problemon, aŭ almenaŭ trovi la vojon al la resaniĝo, al la solvo, kaj eble provi pensi pri la suferoj de la aliaj, kaj provi helpi ilin, por iom forgesi siajn proprajn problemojn.

Ne maltrafu vian rendevuon kun la feliĉo. Tiam kiam vi vivas kaj kapablas pensi, vi ne malfruas.

Bernard Behra


Finiĝis la Abon-periodo 2011

La abon-periodo 2011 jam finiĝis per la lasta numero 156. Ĉi-tiu numero 157 jam estas la unua de la jaro 2012. Ĝi estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj abonintoj. La venontan numeron 158 ricevos nur la abonantoj de la jaro 2012.

La adres-etikedo de via **Informilo** informas vin pri viaj pagoj. La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abon-jaro, pago (A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE UEA ktp.) kaj eventualo pago por la sekvantaj jaroj 2013 - 2014

Se post via adreso troviĝas la mesaĝo "**Fino de abono!!**", tio signifas, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon al **La Informilo** por la jaro 2012. Tiam bonvolu ĝin senprokraste pagi laŭ la ĉi-suba tarifo.

Sam-okaze eblas pagi vian UEA-kotizon laŭ la ĉi-suba tarifo al nia kasisto, kiu senprokraste ĝin perados al UEA.

Jaroj:		2012	2013	2014
Abono por adresoj en Francio:		15 eŭroj	15 eŭroj	15 eŭroj
Abono por adresoj ekster Francio:		18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
Federacia kotizo:		7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj		20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
Por UFE membro: kotizo kun atesto por viaj impostoj		16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
UEA	MG	• Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado.		
	MJ(-T)	• Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 29 jaroj, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago).		
	MA(-T)	• Individua Membro-abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto		
		10 eŭroj	25 eŭroj	61 eŭroj
Pagmanieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2012 por 1027			
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de: Esperanto France-Est sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2012, 2013 ktp. Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.			
	3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)			
	4. Per internacia ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)			
		<h3>Paul-Georges KOCH</h3> <h4>(1908 - 1982)</h4> <p>eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana</p>		<p>Afrankite</p> <p>2 eŭroj</p>
		<p>Pastoro kaj poeto. La lasta elzasa poeto, kiu verkis nur en la germana lingvo. Eta selekto de poemoj tradukitaj al Esperanto fare de Edmond LUDWIG. La libreto ankaŭ entenas mallongan biografion</p>		

... ni provu  rideti !...

Post plezurigaj horoj sur ski-lojpoj, du viroj, unu germano kaj unu franco, sidigas por sin sensoifigi. La germano mendas du bierojn kaj la franco nur unu.

Certagrade perpleksigita, tiu lasta informiĝas :

« Nu, kial vi mendis du bierojn samtempe, tiom pli ke temas pri grandaj glasoj ?

- Vidu... Post tri horoj da ski-ado, mi sentas min tute alia viro... Mi taksas normale oferti ankaŭ al li freŝan trinkaĵon ! ».



Kelkaj kamaradoj de sama regimento decidis iuvespere kunveni por manĝi en restoracio.

La inicianto de la projektita evento, iom timema kaj anticipe jam panikigita, petas informon ĉe amiko.

« Je la fino de la manĝotempo, mi ŝatus eldiri kelkajn vortojn por naski ian entuziasmon ĉe la gastoj ; ĉu ideon vi havas ?

- Tre simple, vi anoncu laŭvoĉe, ke la postulotan ŝuldon vi mem pagos ! ».

Skeptikas riĉa kolektanto de pentraĵoj, antaŭ verko ŝuldata al la fama Rembranto.

La direktoro de la galerio iom malkvietiga, tiom pli ke la vizitanto pretas akiri la pentraĵon kaj pagi la postulatajn dekdu milionojn da dolaroj.

La artisto elvokis murdon de Cezaro far grupo da komplotoj... Unu tenas revolveron en la mano.

« Kio ĉagrenas vin ?

- Fakte, iu indico perpleksigas min. Bonvolu atente rigardi ... Brutuso ŝovis siajn piedojn en tenis-sandalojn ! ».

Viro, akompanata de bela virino gastas en fama restoracio.

La ĉefkelnero, kiu okulumas regule ĉirkaŭen, ekvidas la aluditan klienton, kiu subite falas surgenuen kaj glitas sub la tablon ... Strange, la virino kviete studas la menuon.

Scivolema kaj certagrade maltrankvila, la ĉefkelnero alproksimiĝas kaj duonlaŭte informiĝas :

« Senkulpigu min sinjorino, sed via edzo ĵus glitis sub la tablon ... Ĉu io malbonas ?

- Ne mia edzo glitis sub la tablon... Mia edzo ĵus eniris en la manĝoĉambro ! ».

Angla turisto petas bileton ĉe ĝiĉeto de stacidomo.

« Mi deziras bileton por kapti la trajnon 45 al Parizo, kiu foriras je la 16a kaj 33.

- Nu, sinjoro, mi bedaŭras... Sed la aludita trajno pro ĵusa maloportuna paneo, foriros morgaŭ matene je la 8a.

- Nekredeble ! Vi ŝercas !... Gravan rendevuon mi havas en la ĉefurbo ĉivespere !

- Jes ja, mi kompatas... Sed kial vi ne uzus la trajnon 45 de hieraŭ, kiu ne ankoraŭ startis ? ».

Iu patro, furioziĝas pro la sinteno de sia filo 17 jaraĝa, kiu ofte prunteprenas liajn vestaĵojn.

Tiun vesperon, li denove ekkoleras .

« Hej ! Sed, sed ... vi surhavas mian belan kravaton, kiun ofertis al mi via patrino je mia naskiĝ-datreveno !

- Jes paĉjo, mi pardonpetas ...

- Kaj tiu zono ankaŭ apartenas al mi !

- Fakte jes, sed paĉjo, ni ne dezirus, ke falu nia pantalone ĉu ne ? ».



El sia katedro, spilita vilaĝ-pastro admonas siajn parokanojn.

« Nu, min ja vi ne amas ! Nenian moneron je la dimanĉa monokolekto.

Nur majunaj virinoj ĉeestas la sanktan meson. Pli ol nekoncepteble, vi mem ne amas vin reciproke, ĉar neniam okazas geedziĝo-ceremonioj en ĉi-tiu preĝejo !

...Eĉ Dio vin ne volas: neniam kapablis forpasi iu el vi, depost kiam mi deĵoras en la vilaĝo ! »

Tiu sinjorino vizitas psikiatron...

« Doktoro, mi malkvietiĝas... Mia edzo pensas, ke li estas...mi !

- Tio estas ja stranga sinteno... Akompanu lin ĉi-tien...

- Sed, Doktoro, ĉi-tie mi jam estas ! ».



Juna paro subite vekiga dumnokte pro laŭta ploro de la bubetino.

« Hej, karuleto mia, ĉu vi konsentus stariĝi, kaj esplori la kaŭzon de tiu ĉagreno proponas la ankoraŭ duondormanta edzino... al ni ambaŭ apartenas la idineto, ĉu ne ?

- Prave !... ellitiĝu vi-mem, silentigu vian duonaĵon kaj la mian lasu plori ! ».



Iu policisto admonas aŭtomobiliston, kiu ĵus haltigis sian veturilon en malpermesata loko.

Memkompreneble grumbletas la viro: « Nu, kio pruvas, ke vi estas vera policisto ?

- Ŝŝŝt ! Ne parolu tiom laŭte ! Mi apartenas al la Sekretaj Servoj !...

- ... Sekretaj Servoj ? Sed vi surhavas uniformon !

- Jes ja, hodiaŭ estas mia ripoztago ! ».

Iu patro fieras pri sia unua freŝbakita ideto... Dum promenado en la urboparko alproksimiĝas scivola preterirantino.

« Ĉu vi ne opinias, ke li tute similas al mi pridemandas la patro ?... ».

La virino okulumas sinsekve de la bebo al la vizaĝo de la patro.

« Jes ja, prave ! Sed ne gravas, ĉefas, ke li restu bonsana ! ».

Iu junulo trafas unu el siaj amikinoj...

« Nu, mia blonda karulino, ĉu ci ne vidis, ke unu el ĉiaj ŝtrumpoj estas ruĝa kaj la alia blua ?

- Nu, karulo, ne prialudu tion ! Imagu, ke mi posedas ankaŭ la saman paron hejme ! ».

Foira tago. Stratgapulo ekvidas tendon de aŭguristino. Li eniras. Sidanta antaŭ sia kristalbulo atendas lin maljuna ciganino.

« Bonan tagon ! Mi ŝatus anticipe koni mian futuron ...

- Nenia problemo karulo mia... Nur al du demandoj mi respondos. Ŝuldo ... 50 € ?...

50 €, ĉu vi ne taksas tion multekosta ?

- Tute prave... Pri kio temas via dua demando ? ».

Iu kliento plendas ĉe sia dentisto ...

« Vi certigis al mi, ke tiuj artefaritaj dentoj tute similas al la veraj !

- Prava aserto, rigardu ilin en tiu spegulo, nenia diferenco !

- Eblas, fakte... sed ili dolorigas min !

- Vidu, jen nerufetebla pruvo ! ».

distra



angulo

1 - mistera krado

Transigu la literojn de la supra krado, alfabete ordigitaj en ĉiu kolumno, en la malsupran.

Vi poste povos legi humuran asertaĵon de Sacha Guitry.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	A	D	A	I	I	Ĉ	A	F	E	I
2	D	D	E	M	L	E	E	L	I	N
3	E	I	I	M	N	I	I	O	L	V
4	E	S	Z	N	P	Ĝ		S	O	
5	G	T	Z	O		O		V	V	
6	K	V		P		Ŝ				

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1							*			
2			*				*			
3							*			*
4					*					*
5					*			*		
6									*	*

HORIZONTALALE

- Ekzaltiĝ'.
- Ŝanĝ' de ordo. Trinkaj'.
- Marŝi. Kolora punkt'.
- Grasa. Britia titol'.
- INVERSE: Eluze. INV: Fari ion ne precizigitan.
- Movata al si.
- Rilat' al brita insularo.
- Centro de metro. Korpa malmola substanc'.
- Interreta taglibr'. Numeralo.
- Hinda piul'.
- Interjekcio. Vand' malantaŭ altaro.
- Baril' el kunigitaj feraj stangoj. Ŝtona konstruaĵo.
- Korna ekstremaj' de birdoj. Malpac'.
- Eŭropa land'. Konjunkcio.
- Sperta instru'. Adverbo.
- Granda usona lag'. Ĉirkaŭas ies talion.
- INV: Regnokodo de la lando kaŝita en la 14a linio. Rimark'.
- Kurmanier'. Fino de milito.

2 - krucvort-enigmo

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1									
2									
3									
4									
5									
6									
7									
8									
9									
10									
11									
12									
13									
14									
15									
16									
17									
18									

Tiun kradon ni ŝuldas al nia fidela kontribuanto Joël Grandjean

VERTIKALE

- Haŭta tavolo'. Paperfoliet' kun mona valoro.
- Afrodit'. Prepozicio. Inflam' de korpaj kanaletoj.
- Teksaj' farita el lanaj fadenoj. Dorna arb'.
- Sufikso. Malantaŭa part' de armeo. Pronomo. Litera nomo.
- Rilat' al konfuza bruo. INV: Adverbo. Bradip'. Neforgesumin'.
- Civitan' de la lando kaŝita en la 14a linio. Nenormala puls'. Substantiv'.
- Seksumiĝas. Vira nomo. Negi.
- Futbala avanulo. Tajla diamant'.
- Malsan' kaŭzata de ojdio. Pantalonet'. Ekzisto.

Solvoj de la lasta enigmo- 156

1 - ŝmilblik - Nuntempe, libro sukcese vendiĝas, se kuŝas belulino sur la kovrilo, ĝi ankoraŭ pli sukcese vendiĝas, se ne estos kovrilo sur la belulino.


2 - krucvort-enigmo - karbonĉen' - akaro - iza - lecionar' - aniz' - mam - tru - apne - vlak - slanga - ls - kel' - envii - uzino - iam - kusenet' - urtik' - al - mo - slumoj - otito - krajonet' - orok' - poro - paliĝi - ir' - anemioj - nitas - ark'



"Internacia Festivalo" 2012
Ĝojan novjaron !



Faculté des Lettres et Sciences Humaines - MULHOUSE
Festo de la Lingvoj - 17an de marto
Edmond LUDWIG ĉe Esperanto-montrotablo



Universito de Esperanto (Hainan) - unua sesio 2012
paŭzo - Edmond Plutniak skeĉumas ! - Profesoro Gobbo prelegas pri informadiko



Internacia Virino Tago 2012 en Hiroŝimo
ekspocio de la mesaĝoj en esperanto ricevitaj el la tuta mondo